

Heinrich Heine,  
[Ne scias mi, kio okazis]

*tradukita de Paul Gottfried Christaller*

*El la "Libro de la kantoj", parto "La Reveno".*

Ne scias mi, kio okazis  
al mia tristema kor':  
Antikva legendo min kaptis,  
ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile  
murmuras kiel mister',  
la supron ŝtonegan orumas  
sunbriloj de la vesper'.

Plej bela virgino jen sidas  
mirinda sur la montet'  
kaj ŝia oraĵo radias,<sup>4</sup>  
ŝi logas kiel magnet'.

Ŝi kombas la oran hararon  
abundan per ora kombil',  
kantante misteran lidon,<sup>5</sup>  
ravantan kiel sunbril'.

Ŝipisto en sia ŝipeto  
kaptiĝas per stranga dolor',  
la rifon li tute ignoras.  
atentas nur ŝin kun fervor'.

Mi kredas: la ondoj englutas<sup>6</sup>  
ŝipiston, ŝipeton je l' fin',  
kaj kulpa pri tio nur estas  
kantado de la virin'.

...

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold Elb*

*Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.*

Ne scias mi, kial mi estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,  
Fluadas la Rejn' en trankvil',  
La supro de l' monto lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon kronas  
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

Kaj sopiregon eksentas  
Ŝipisto dum sia vetur';  
Rifaron li ne priatentas,  
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronos finfine  
Ŝipisto kun sia boat',  
Kaj tion kaŭzis feine  
La Loreleja kantad'.

...

Heinrich Heine,  
Lurleia

*tradukita de N. N. 01*

Ignoro, quid id sibi velit,  
Tristissimus cur sim,  
Antiqui aevi fabellam  
Cur saepe volverim.

Vesperascit et frigescit,  
Et Rhenus leniter it,  
Cacumen montis lucescit,  
Dum Phoebus occidit.

Sedet in summo montis  
Virgo pulcherrima,  
Auro nitet gemma frontis,  
Se pectit auricoma.

Aureolo pectine pectit,  
Carmen canens procul,  
Mirandum id habet modum  
Nec non virilem simul.

In cymba navitam mille  
Angores feri tenent,  
Non videt scopulos ille,  
Ocli non si sursum vident.

Opinor undas devorare  
Nautam cum navicula,  
Effecit solo canendo  
Lurleia id dea.

...

<sup>4</sup>En la sube menciita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia". Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

<sup>5</sup>En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

<sup>6</sup>Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.

Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (\*1860-08-21 – †1950-12-31).

Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiisti tiun ĉi tradukon el la libreto “H. Heine - Libro de Kantoj”, eldonita en 1911 de la “Esperanto-Propaganda Instituto” (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: “Buch der Lieder”, Abschnitt “Die Heimkehr”. - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia retejo [http://de.wikipedia.org/wiki/Paul\\_Gottfried\\_Christaller](http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller), kun foto de li.

Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

Traduko de la Germana poemo “Die Lorelei” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.

Arg-2-179  
14:00:52)

(2010-02-11